

ISSN 0023-3692

KIAXIO

numero 223 (2008:1)



(Ne) Ordinaraĵ Hobioj

Saluton, karaj legantoj kaj amikoj de **KONTAKTO**!

La ĉefa temo de tiu ĉi numero estis anoncita kiel “(Ne)ordinaraj hobiaj” – kaj mi esperas, ke dank’ al tiu ĉi numero vi povos ekscii ion vere nekutiman kaj eble eĉ trovos iun novan ŝat-okupon. Interalie sur la paĝoj de tiu ĉi numero vi povos eskcii pri geokaŝado (relative nova okupo, utiliganta la modernajn teknikarojn, sed esence simila al la infanaj ludoj pri trezor-serĉado), pri bilet-kolektado (kiu estas ŝajne simpla, sed tute ne seninteresa hobia) kaj pri la kajado – la arto dresi drakojn. Plie, vi povos legi la intervjuon kun fama “intelektala ludanto” Boris Burda, kiu detale rakontos pri sia ĉefa hobia – intelektalaj ludoj (kaj, interalie, vi povos ankaŭ kontroli viajn kapablojn pri tio!).

Krom tiuj “temaj” kontribuoj vin atendas ankaŭ pensigaj artikoloj-meditoj pri la lingva imperiismo (kiu foje estas kontraŭbatalata per iom nekutimaj manieroj) kaj pri la pureco de necesoj (kiu estas mirinde ligita al la pureco anima). Kaj kiel ĉiam, vin atendas facila teksto, recenzo, bumerango kaj malgranda komikso. Bonan legadon!

Mi deziras al ĉiuj legantoj bonfarton kaj fine de mia saluto denove invitas ĉiujn kuraĝe kaj aktive kontribui al la sekvaj numeroj de **KONTAKTO**! Ĉiuj viaj leteroj, (mal)laŭdoj, sugestoj kaj – ĉefe! – kontribuoj estas ege atendataj kaj ĉiam bonvenaj!

Paŭlo

Kiel sendi kontribuojn al **KONTAKTO**?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ **KONTAKTO** ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! Koran antaŭdankon!

<ENHAVO>

Malpli romantika... sed pli naturamika! (Marek Blahuš, Ĉeĥio, kaj Rolfo, Svisio)	3-5
Intelektalo aŭ ludoj? (intervjuo kun Boris Burda)	6-7
Kontrolu vian spritecon!	7
Pura neceso = pura animo (Etsuo Miyoshi, Japanio)	8
Herooj de lingva imperiismo (Roman Dobrzyński, Pollando)	9
La arto dresi drakojn (Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio).....	10-12
Bilet-kolektado: same interesa! (Vladimir Melnikov, Rusio)	12
Rat-Man.....	13
Recenze: Akceptinda invito.....	14
Bumerange	14
Informe	15
Dolĉa inkujo aŭ leciono de rido (Maria Lajevskaja, Belorusio).....	16

Temoj de la venontaj numeroj de **KONTAKTO**

Numero 224 (2008:2). La ĉef-temo – “Teknologioj kaj scienco”.
Numero 225 (2008:3). La ĉef-temo – “Edukado tra la mondo” (la limdato – la 1a de junio)
Numero 226 (2008:4). La ĉef-temo: “Politikaj unioj – ĉu vere unuecaj?” Ne estas sekreto, ke kvankam la limoj inter ŝtatoj fariĝas pli kaj pli efemeraj, ili plu restas en la homaj kapoj. Rigardante eĉ la Eŭropan Union oni povas facile konstati, ekzemple, ke la forigo de limoj ne egaligas la kondiĉojn en ĝiaj landoj. Ĉu do la diafaneco de la limoj kontribuas ankaŭ al la inter-avido? Kiom similaj kaj uniaj fariĝas la landoj kaj kulturoj en Eŭropo kaj en aliaj superŝtataj unuigoj (modernaj kaj iamaj)? Rakontu, legu, diskutu! La limdato – la 1a de aŭgusto.

Ĉiuj viaj artikoloj (ajnatemaj) kaj proponoj estas bonvenaj kaj tre bezonataj!



KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Fondita en 1963. N-ro 223 (2008:1), 45-a jarkolekto. ISSN 0023-3692. Legata en ĉ. 90 landoj. TTT-paĝo: <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. Eldonto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA: * Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. Redakcio: **KONTAKTO**, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. Redaktoro: Paŭlo Moĵajev (Ukrainio). Grafikisto/vic-redaktoro: Eugenia (Ĵenja) Amis (Ukrainio/Usono). Korektisto: Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. Konstantaj kunlaborantoj: Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniele Binaghi (Italio), Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko, (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). Facillingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de **KONTAKTO**. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. Anonctarifo: Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajn de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. Anoncoj: por Anonctabulo kostas tri internaciajn respondokuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. Abontarifo: varias laŭlande. Petu informojn de UEA. Malfortvidantoj: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO** en radioj: Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). La redakcio kaj la eldonanto ne respondekas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

MALPLI ROMANTIKA... SED PLI NATURAMIKA!

Por trezorĉasado necesas du aĵoj: la trezoro kaj la mapo por trovi ĝin. Kaj kio, se la “trezoro” estas kaŝita por ke oni povu trovi ĝin, kaj la “mapo” estas elektronika?!

Marek Blahuš, Ĉeĥio, kaj Rolfo, Svisio

Dank’ al la loktrova sistemo GPS (pri ĝi legu flanken), en la jaro 2000 aperis nova tutmonda hobbio. Geokaŝado (angle *geocaching* [ĝiokeŝing]) estas ludo, situanta ie meze inter sporto kaj turismo, kies esenco estas la utiligo de la GPS por serĉi kaŝitan objekton (*kaŝujon*), pri kiu oni scias nur ĝiajn geografiajn koordinatojn. Dum la serĉado oni uzas ordinaran poŝformatan GPS-ricevilon (birilon*). Persono okupiĝanta pri geokaŝado nomiĝas *geokaŝanto* aŭ *geokaŝisto* (depende de la adepteco – kaj geokaŝado estas dependige amuza por pluraj homoj).

500 MIL TREZORKESTOJ!

Tutmonde ekzistas jam pli ol 500 mil tiaj kaŝitaj ujoj. Al la plej aktivaj geokaŝadaj regionoj apartenas Nord-Ameriko (en Usono, kie la ludo naskiĝis, troviĝas ĉirkaŭ du trionoj el ili) kaj Eŭropo (ekz. Skandinavio, Svisio, Germanio), sed kaŝujoj ekzistas en ĉiu lando de la mondo. Ĉiutage aperas novaj, kaŝitaj de kreemaj kunludantoj. La ludon oni povas ludi sole, sed ĝi havas altan taŭgecon ankaŭ por familioj kun infanoj. Geokaŝado donas bonan eblon ĉesigi la surseĝan sidadon antaŭ komputilo kaj eliri eksteren por movi sian korpon. Tutmonde ekzistas jam preskaŭ 50 mil ludantoj.

La kaŝujoj – multegaj el ili

troviĝas ĉe aŭ apud vizitindaj lokoj en urboj aŭ naturo – havas diversajn grandecojn. Kelkaj estas nur tridek-kvin-milimetraj filmujoj. Plej kutimas plastaj skatoloj, dimensie kompareblaj al la paĝo A5. En la kaŝujoj troviĝas minimume notkajereto (*protokolibro*), en kiun la trovinto notu sian kromnomon kaj la aktualan daton (kaj laŭvole postlasu alian komenton por la posedanto). La pli grandaj ujoj entenas etajn objektojn por interŝanĝo. La baza regulo estas: se oni volas ion elpreni, oni interŝanĝe enmetu ion samvaloran. Tiaj kaŝujaĵoj havas kutime

nur malgrandan valoron, ekz. etaj ludiloj, ŝlosil-ringo... Kelkaj objektoj vojaĝas de kaŝujo al kaŝujo tra la tuta mondo, kaj ilia vojaĝo estas sekvebla interrete.

INTERRETO: VIA UNUA PAŜO AL LA TREZORO!

Kutime, se iu volas partopreni la ludon, li unue vizitas la retejon www.geocaching.com kaj trovas tie laŭ diversaj kriterioj la lokon, kie troviĝas iu kaŝujo (ekz. en la regiono, en kiu oni planas ferii). Plej grava indiko en la priskribo de

la kaŝujo estas la koordinatoj de la loko, kien oni iru por ĝin trovi. Krome en la paĝaro videblas la ĝenerala malfacileco de la serĉo (inter 1 kaj 5) kaj la terena malfacileco; oni povas ekscii ankaŭ pri la grandeco de la ujo, pri la tempo de ĝia apero, pri tio, kiu estas ĝia posedanto, kiom da vizitintoj jam trovis la objekton, aŭ de kia speco ĝi estas (ekzistas la t.n. enigmaj kaŝujoj, ĉe kiuj oni devas unue cerbumi solvante iuspecan enigmon, kies rezulto donas la koordinatojn). Krome ofte troviĝas la informoj pri la loko mem de la kaŝujo, ekz. historiaj faktoj, bildoj ktp. Vizitinte la paĝaron necesas enmeti (mane aŭ komputile) la koordinatojn en la birilon (GPS-ricevilon).

Poste oni ekiras al la koncerna loko, depende de la

Kio estas GPS?

La angla mallongigo GPS signifas *Global Positioning System*, Esperante *Tut-tergloba Pozicitra Sistemo*, foje nomata ankaŭ *bira sistemo*. Ĝi estas satelita loktrova teknologio, uzata por determini ekzaktan geografian pozicion kaj provizi tre precizan spacan referencon preskaŭ ĉie ajn sur la planedo. Ĝi oficiale ekfunkciis en julio 1995 cele al milita uzo, sed ekde la 1-a de majo 2000 ĝi estas libera por publika uzo. La sistemo uzas aron de almenaŭ 24 satelitoj situantaj ĉe la meza tera orbito. Por determini la ekzaktan lokon (kutime la ĝusteco estas malpli ol dek metroj), la birilo devas ricevi la signalon de almenaŭ kvar satelitoj. GPS-signalon estas komparebla al terfrekvenca radio – ĝi funkcias nur unudirekte. Normala birilo ne sendas datumojn reen al la satelito, do oni ne bezonas timi, ke oni estas prispionata. Al moderna birilo sufiĉas indiki la landon, urbon, straton kaj numeron de la celloko – kaj post kelkaj sekundoj sur la ekrano aperas la distanco al la loko, la vojo, kiun oni sekvu, la tempo bezonata, ktp. Kompreneble oni povas alternative simple tajpi la koordinatojn – ekz. la Centra Oficejo de TEJO en Roterdamo troviĝas ĉe N 51° 54,834’ E 004° 27,867’ (estas

indikitaj la gradoj, minutoj kaj milonaj minutoj por longitudo kaj latitudo).

Plej ofte tiaj biriloj estas uzataj por la navigadsistemoj por aŭtoj, sed ekzistas ankaŭ portebaj biriloj por biciklantoj, promenantoj ktp. Ankaŭ iuj trajnoj kaj aliaj publiktransportaj veturiloj uzas la birilsistemon, ia. por informi la pasaĝerojn pri la pozicio kaj veturdaŭro ĝis la sekva stacio. Bonaj biriloj servas ne nur kiel bona kompas, sed povas enhavi kompletajn kaj detalajn mapojn de tuta lando aŭ eĉ tuta kontinento. Sur tiuj mapoj troviĝas multaj aliaj informoj (ekz. pri plej proksimaj bankmaŝinoj, restoracioj, benzinejoj, vidindaĵoj ktp.). Tiuj informoj estas konservataj en la birilo mem, tial ili, kompreneble, povas malaktualiĝi. Fojfoje do necesas ĝisdatigo de la mapa materialo, kio povas okazi perkomputile. Lastatempe aperis ankaŭ poŝ-telefonoj kaj poŝkomputiloj, kiuj enhavas birilon.



distanco, aŭte, trajne, piede, bicikle, ajne. La birilo montras ne nur la direkton al la celo per sago, sed ankaŭ multajn aliajn informojn, ekz. oni povas legi la aktualan rapidecon de la trajno, en kiu oni sidas, aŭ kiom da kilometroj estas jam trairitaj, kiel nomiĝas la preterirataj riveroj ktp.

Kiam oni alproksimiĝas al la ejo, kie troviĝas la kaŝujo, necesas atente observi la sagon sur la ekraneto, kiu gvidas al la celo. La birilo diras, kiom for de la celo oni estas kaj kiom ĝusta estas tiu indiko: ekz. “ankoraŭ restas 34 metroj, plus-minus 15 metroj”. Kelkaj lastaj metroj estas ĉiam la plej malfacilaj, ĉar la precizeco de la birilo varias, plej ofte pro malbona ricevo de la satelita signalo. Alproksimiĝinte la kaŝejon, oni devas ekserĉi: ofte la kaŝitaj ujoj troviĝas en truo de arba radiko, aŭ malantaŭ movebla ŝtono en muro, aŭ temas pri magnete fiksita ujo sub iu metala objekto (ekz. ponto). Foje necesas nur serĉeti, sed foje necesas serĉegadi dum duonhoro aŭ pli. Foje okazas, ke la objekto tute ne estas trovebla, ĉar ĝi estas (intence) kamuflita aparte bone.

Kiam oni trovas la objekton, oni malfermas la ujon kaj notas en la kajereto sian ludanton, la aktualan daton kaj iujn personajn impresojn (ekz., kiel facile estis trovita

la ujo, ĉu la ĉirkaŭa loko estas bela ktp.). Ofte oni enskribas dankon al la posedanto. Kaj, kompreneble, oni povas legi, kion skribis la antaŭaj trovintoj. Fine oni refermas, remetas kaj rekamuflas la kaŝujon.

Kiam oni revenas hejmen, oni denove vizitas la geokaŝan retejon kaj priskribas tie sian “trovon” (aŭ “netrovon”) en la koncerna paĝo. Tiel la kaŝujkreinto povas esti informita pri la aktiveco kaj stato de la ujo. Ĉiu homo, kiu faris tian enskribon, ricevas unu poeton en sia persona statistiko. Iuj geokaŝistoj jam kolektis plurajn milojn da tiaj poentoj, do ili jam trovis milojn da kaŝujoj!

GEOMONEROJ, VOJSKARABOJ... KAJ NENIUJ SKELETOJ!

En la geokaŝado ekzistas diversaj manieroj pliinteresiĝi la ludon. Unu el la plej ŝataj manieroj estas la spureblaj objektoj. Temas pri objektoj, kiuj migras tra la tuta mondo, de kaŝujo al kaŝujo, kaj per la centra geokaŝada retejo (www.geocaching.com) oni povas ĉiam ekscii, kie ili nuntempe troviĝas kaj kiom da kilometroj ili jam travojaĝis. Oni povas eĉ videbligi la tutan vojon sur mondonmapo. Ĉio ĉi okazas helpe de individua numero,



kiu troviĝas sur la koncerna objekto. Nur tiu, kiu scias tiun numeron, rajtas registri translokiĝon de la objekto. Ekzistas baze du kategorioj de spureblaj objektoj:

Vojskarabo (angle *travel bug*, kio signifas ankaŭ “vojaĝemulo”) estas maldika metala etiketo (ŝildeto), kiun oni fiksas al certa objekto. Tiu objekto vojaĝu ien ajn aŭ al certa loko laŭ difinita misio, ekzemple “vojaĝu al Romo” aŭ “ĉiu trovinto sendu sian foton kun la objekto” aŭ “laskaraboiru ĉ i a m

trovo, transportas ĝin al la sekva kaŝujo agante laŭ la misia priskribo, kiu kutime estas aldonita kaj en la retepaĝo, kaj papere ĉe la objekto. Fine, necesas ke la ludanto indiku ankaŭ, kiam li enmetis la vojskarabon en la novan kaŝujon (se li jam faris tion) – tiel la informoj pri la pozicio de la “migranto” estos ĉiam aktualaj.

Geomoneroj (ankaŭ nomataj *geomedaloj*) estas aliaj tre ŝataj objektoj en geokaŝado. Baze ili funkcias kiel vojskaraboj, ĉar ankaŭ ili havas individuan numeron, per kiu oni povas spuri ilin. Tamen, kutime ili ne estas fiksitaj al iu objekto, ĉar jam per si mem ili estas interesaj. La geomoneroj estas bele desegnitaj medaloj, iom kompareblaj al poŝtmarkoj: arto sur eta spaco. La desegnaĵoj havas plej diversajn temojn: bestoj, landoj, jubileoj, naturo, ktp. La geomoneroj ne nepre estas cirkle rondaj, sed povas havi ĉian eblan formon. La kutima grandeco estas inter 30 kaj 50 milimetroj diametre. Ekzistas ankaŭ la t.n. mikromoneroj, kiuj havas diametron de nur 25 mm. aŭ eĉ malpli.



orienten” k.s., tute laŭ la fantazio de la posedanto. La malkovrintoj de la vojskarabo prenas la objekton el la kaŝujo, rete raportas pri la



Trovu la diferencon!



Tiu kaŝujo troviĝis en arbostumpo apud vojo en arbaro


La geomoneroj estas kutime produktataj en malgrandaj kvantoj (kelkaj centoj) kaj servas plej ofte kiel kolektaĵoj – nur ĉ. 20% estas uzataj en la ludo mem, la resto jam troviĝas en albumoj de kolektemuloj. La unua geomonero estis produktita en 2001 fare de geokaŝisto Moun10Bike. Nuntempe tiu geomonero valoras pli ol 2000 usonajn dolarojn por kolektaĵoj. Ĝis fino de la jaro 2007 ekzistis preskaŭ du mil diversaj geomoneroj.

La geomoneroj estas aparte ŝatataj, ĉar ĉiu monero havas sian propran simbolon (vinjeton), kiu aperas rete kune kun la kaŝujo, en kiu troviĝas la monero. Vidinte kaj transportinte la geomoneron, la geokaŝisto “ricevas” tiun simbolon, t.e. ĝi aperas porĉiame en lia konto-paĝo en la paĝaro. Do la kaŝisto havas virtualan kolekton de ĉiuj geomoneroj (kompreneble nur de ties simboletoj), kiujn li iam vidis dum la ludo.

SPERTOJ DE GEOKAŜADO

Pri geokaŝado okupiĝas multaj homoj kaj ĉiu el ili trovas ĉe la ludo siajn proprajn ŝatatajn trajtojn. Multaj opinias, ke dank’ al geokaŝado oni povas pli bone konatiĝi kun sia propra lando aŭ iu loko, al kiu oni vojaĝas. La ludo ofte gvidas al nekonataj belaj lokoj, pri kiuj oni eble tute ne eksciis ekster la ludo. Tiel geokaŝado plivastigas onian horizonton.

Jen la sperto de Niko el Nederlando, kiu unue konatiĝis kun geokaŝado dum renkontiĝo de esperantistoj en Würzburg. Unu kaŝujo troviĝis super iama fortikaĵo, kaj por atingi ĝin oni devis eniri publikan ĝardenon. Ĉirkaŭ la fortikaĵo estis fosaĵo, do oni estis devigitaj subeniri en la fosaĵon, poste tra tre mallarĝa truo eniri la senluman kavern-similan fortikaĵon, kaj poste per ŝtuparo supreniri. Tie jam inter arbaj radikoj oni trovis la kaŝujon – sur verda



Tiel aspektas kutima mapo al la “trezoro”

“insulo” atingebla nur tra la subtera fortikaĵo. Aliaj kaŝujoj de tiu tago troviĝis ĉe malnova urbopordego, en kaŝita korteto apud preĝejo kaj ĉe bela ponto ornamita per leonoj. Niko diris, ke al li tre plaĉis la ludo, li pensas, ke ĝi estis tre bona maniero por ekkoni la urbon, ĉar la kaŝujojn plej ofte kreas la lokaj homoj, kiuj tre bone scias, kiuj lokoj estas atentindaj. Ofte oni eĉ aldonas kelkajn informojn pri la loko en la priskribon. La priskribaro de geokaŝado tiel iĝas grandega datumbazo pri lokaj sciindaĵoj kaj vidindaĵoj.

GEOKAŜADO KAJ ESPERANTO

Geokaŝado estas ludo internacia kaj aparte taŭga por vojaĝantoj kaj personoj, kiuj ŝatas malkovri novajn lokojn kaj faktojn – ne mirindas, ke la ludantoj-esperantistoj nemalmultas. Jam aperis ankaŭ iniciatoj, kiuj diversmaniere kunligas geokaŝadon kun Esperanto.

Ekzemple dum la Esperanto-renkontiĝo Internacia Seminario 2007/2008 en Germanio estis organizita geokaŝada programero, partoprenita de dek kvar esperantistoj. Dum la programero oni promenis apud la urba burgo kaj ne nur konatiĝis kun la ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ kolektis indikojn por poste uzi ilin dum

kalkulo de la koordinatoj de geokaŝujo, trovebla interrete laŭ la kodo GCMVAN.

Kelkaj esperantistaj kluboj uzas geokaŝadon por atentigi turistojn pri iu loka vidindaĵo kaj samtempe pri Esperanto. Tiel, ekzemple, esperantistoj el Nebraska, Usono, jam en 2002 starigis kaŝujon (GC37CE, ne plu aktiva) kun la temo “Esperanto” en la Preria Paco-Parko, apud pavilono dediĉita al Esperanto kaj Zamenhof. La junaj esperantistoj el Brno, Ĉeĥio, inter kiuj estas plurmembra grupo de geokaŝantoj, subskribas siajn grupajn trovojn kiel “team’ esperanto”, informas pri la lingvo en siaj ludanto-profiloj kaj planas starigi serion de kaŝujoj, kiuj instruu Esperanton – la koordinatojn de ĉiu el tiaj enigmaj kaŝujoj la ludanto ricevas nur ĝuste respondinte kelkajn kontrol-demandojn fine de certa leciono de Esperanto. Pro tio, ke geokaŝantoj estas kutime homoj scivolemaj kaj ofte faras ĉion ajn por trovi plian kaŝujon, estas probable, ke pluraj el ili vere farus tian penon.

Same kiel multegajn internaciajn projektojn, ankaŭ la geokaŝadon negative influas la lingvaj baroj. Pro tio, ke la ludo originas el Usono, la centra retpaĝaro ekzistas nur en la angla lingvo. Por komunikiĝi inter si la ludantoj uzas jen la

respektivan nacian lingvon (kaze de kaŝujoj en certa lando), sed en la kazoj, kiam la internacieco estas aparte bezonata (ekz. dum la spurado de la vojskaraboj) multaj emas skribi komentojn en la angla lingvo (ofte fuŝa). Priskriboj de certaj kaŝujoj ekzistas plurlingve, ofte loklingve kaj angle, sed kelkfoje aperas ankaŭ Esperanto (ekz. priastronomia serio de ok kaŝujoj en Svisio – ia. GCXX1G – aŭ la ĉefia kaŝujo GCYRKJ). En Graz (Aŭstrio) eĉ okazis, ke neesperantisto starigis kaŝujon (GCXQPT) apud Esperantomonumento kaj jam poste lin kontaktis esperantisto, kiu provizis la tradukon de la priskribo en Esperanto.

La verkintojn de tiu ĉi artikolo eblas trovi en www.geocaching.com laŭ la kromnomoj “blahma” kaj “ernies”. Rolfio eĉ eldonis propran geomoneron kun surskriboj i.a. en Esperanto (rigardu la foton en la supra angulo de la paĝo 4).



<RETE>

<<http://www.geocaching.com>> – la centra retejo de la ludo, kie eblas trovi la informojn pri la ekzistantaj kaŝujoj

<<http://www.ipernity.com/group/36372?lg=eo>> – Iperity-grupo, celanta kunligi esperantistajn geokaŝantojn

* **bir/i tr** (laŭ PIV) – precizigi la pozicion de punkto en la spaco per mezurado de direktoj al du aŭ pluraj aliaj fiksaj punktoj, per trigonometriaj metodoj.



KOMPLEZE DE B.B.

Intelektto aŭ ludoj?

Nia konstanta korespondanto intervjuis unu el la plej famaj personoj de la mondo de Intelektaj Ludoj. Boris Burda mem rakontos pri sia “stranga hobbio”.

– *Boris, oni konas vin kiel multfojan venkanton de Intelektaj Ludoj. Sed kio estas tiu stranga afero – Intelektaj Ludoj? Kutime, kiam temas pri iu serioza problemo, oni diras: “Por solvi tion, bezonatas intelekto – ja tio ne estas ludo!” Do, por ordinara homo intelekto estas io kontraŭa al neseriozaj ludoj. Kiamaniere tiuj nocioj povas kuniĝi?*

– Oni ne pensu, ke intelekto estas bezonata nur por solvado de seriozaj kaj ne ĉiam agrablaj problemoj. Ekzistas ankaŭ ludoj, kie oni devas ne kuri kaj salti, sed pensi. En Intelektaj Ludoj oni konkuras pri forteco kaj lerteco ne de muskoloj, sed de la penso. Ĝuste tio estas ilia esenco. Ekzemple, ankaŭ futbalo bezonas intelekton, tio estas grava por ĝi; sed la forto kaj lerto estas pli gravaj. Kaj jen ŝakoj – tipa intelekta ludo.

– *Mi komprenas. Intelekta Ludo estas, ekzemple, kvizo, ĉu ne?*

– Estas interesa demando. Imagu, nur parte kaj ne ĉiam. Kompreneble, ekzistas multegaj limaj situacioj, kaj eĉ ne ĉiam oni povas diri kun certeco, ĉu iu certa ludo apartenas al Intelektaj Ludoj aŭ ne. Sed ĉe ni oni kutime atendas de Intelekta Ludo, ke ĝi postulu ne nur erudicion kaj bonan memorkapablon. Necesas, ke dum la ludo oni nepre pensu memstare, logike; ke la respondo estu rezulto ne de la antaŭa scio, sed de brila intuo, eklumo, kompreno...

– *Do, kiun ludon vi senrezerve nomus Intelekta Ludo?*

– La tipa ekzemplo de Intelekta Ludo estas la ludo “Kio? Kie? Kiam?”. Ĝi naskiĝis en Sovetunio en la formo

de televida programo en 1975, tuj iĝis tre populara kaj ĝis nun estas montrata televide. Ĉi-jare tiu TV-programo iĝos 33-jara, kaj ĝia sukceso estas seninterrompa. Interalie, tio jam ne estas nur televida programo, ĉar miloj da homoj ludas tiun ludon en siaj lernejoj, universitatoj, kluboj. La lastan, sesan mondĉampionadon de “Kio? Kie? Kiam?” partoprenis teamoj el 20 landoj, kaj ne nur el la landoj de eksa Sovetunio. Ludis teamoj el Usono, Britio, Finnlando, Germanio, Israelo. En ĉiuj landoj, kie ekzistas pli-malpli rimarkinda ruslingva diasporo, oni ludas “Kio? Kie? Kiam?”. Mi pensas, ke plenrajte mi povas nomi

tute nerimarkeble okazas ene de nia kranio, kaj tio estas neimageble interesa.

– *Kaj kio pri la luda varianto?*

– La kvanto de la dezirantoj ludi ĉiam ege superas ses. La teamoj multas, ili volas ekscii, kiu el ili estas pli forta, kaj laŭ TV-varianto ekscii tion malfacilas: ja ĉiu teamo respondas unikajn demandojn. Kompreneble, tiuj demandoj estas elektitaj hazarde kaj ne estas konataj al la teamo antaŭ la ludo – sed ne ekzistas absolute samvaloraj kaj sam(mal)facilaj demandoj. Sed se kelkaj teamoj ludos la samajn demandojn en televida varianto, la ludo perdos la sencon, ĉar unu teamo povos aŭskulti la diskutojn de la aliaj, kaj

Boris Burda naskiĝis en 1950 en Odeso (Ukrainio). Laŭ la fako li estas inĝeniero, sed multege da tempo li dediĉas al siaj hobbioj: intelektaj ludoj, barda kant-arto (li estas laŭreato de multaj bardaj festivaloj) kaj kuir-arto (li gvidas kuir-artan programon en la ukraina televido). En la televida klubo “Kio? Kie? Kiam?” Boris estis premiita per du kristalaj strigoj (premio por la plej bona ludanto de la lud-serio, jare okazas kelkaj serioj) kaj per unu diamanta strigo (premio por la plej bona ludanto de la jaro). Li estas ankaŭ amiko de Esperanto kaj partoprenis la festivalon “Velura Sezono” en Jalto (Krimeo).

tiun ludon la etnokultura signo de ĉiuj homoj, kiuj parolas kaj pensas ruse; same, kiel taŭrobatalo historie antaŭe markis hispanojn aŭ ikebano* – japanojn.

– *Kio ja estas esenco de tiu ludo?*

– Ekzistas du ĝiaj variantoj: televida kaj luda. En la televida varianto la ssekapa teamo respondas al demandoj, senditaj de la televid-spektantoj. Se la teamo sesfoje respondos ĝuste, ĝi gajnos; se 6-foje eraros – malgajnos. Por trovi la respondon ĝi havas precize 1 minuton, poste oni devas respondi; se oni ne sukcesis respondi, do oni malgajnis. La plej interesa parto de tiu varianto de la ludo estas ĝuste tiu minuto de diskutoj. La ludantoj interkonsiliĝas, laŭte eldiras siajn pensojn, opiniojn, kontestas la versiojn, kiuj ŝajnas al ili eraraj (kaj eble eraras pri tio). Unuvorte, ni vidas kaj aŭdas, kiel la ideo naskiĝas antaŭ niaj okuloj; ni observas laboron, kiu kutime

ne klaros, al kiu unue venis la ideo. Tial en la “luda” varianto de la ludo multaj teamoj diskutas samtempe, ankaŭ dum unu minuto, kaj poste respondas skribe. Gajnas la teamo, kiu donos plej multe da ĝustaj respondoj. Tiamaniere eblas organizi samtempan ludon de tre multaj teamoj: mi iam vidis, ke konkuris eĉ 50!

– *Nu, kaj kio intelekta estas en tio? Se vi scias – vi respondas, se ne – ne. Kiu havas pli bonan memorkapablon, tiu gajnas.*

– Ne tute kaj ne ĉiam. Se al iu demando eblas respondi, simple sciante iun fakton – tio estas malbona demando. La respondo al bona demando ne postulas specialajn sciojn. Konata IL-ludanto Andrej Kamorin iam diris, ke por respondi bonan demandon sufiĉas la scioj, kiujn donas mezlernejo, do – posedataj de averaĝa homo. Kaj mi, kiam penas komprenigi, kia demando

estas bona, mencias la jenan reagon de iu teamo: “Nu kial mi ne komprenis, pri kio temas? Mi ja ĉion sciis, kaj aŭdinte la respondon, eĉ miris, kiel klara ĉio estas!”

– **Bonvolu doni la ekzemplon de tia “bona demando”.**

– Ekzemple: “Kial ĉe ambulanc-aŭto la planko estas pli malalta, ol ĉe la aliaj aŭtoj?” Malverŝajnas, ke iu speciale scias tion, sed kompreni estas tre facile.

– **Do kial?**

– Vere, la respondo estas tre facila. Necesas pensi, pri kio entute ambulanc-aŭto diferencas de aliaj aŭtoj. Nu, ĝi devas veturi rapide – sed ankaŭ aliaj aŭtoj povas veturi rapide. Ĝi devas havi sirenon – sed ĉu por tio bezonatas la malalta planko? Tamen, dum la teama diskuto iu nepre rememoros, ke kiam tiu aŭto alvenos al la paciento, ofte estos bezonate rapide enaŭtigi la brankardon, kaj por ke tiu laboro estu facila, la planko devas esti plejeble malalta. Ĉu ne simple? Kaj oni ne devas tion scii – oni komprenas.

Kaj jen ankoraŭ demando: por kiu profesio la profesia malsano estas malboniĝinta aŭdkapablo ĉe nur maldekstra orelo? Eĉ ne ĉiuj kuracistoj scias tion, sed oni povas pensi kaj kompreni. Do, kiu povus suferi je tia malsano? Tiu, kies maldekstra orelo aŭdas pli laŭtajn sonojn, ol la dekstra. Ĉu pafistoj? Ne, ili kutime tenas armilon ĉe la dekstra ŝultro, kaj la lezata orelo do estas dekstra. Ĉu nitistoj, artileriistoj, eksplodistoj? Ne, iliaj ambaŭ oreloj suferas proksimume samgrade. Ĉu muzikistoj? Sed kiu el ili per maldekstra orelo aŭdas pli fortajn sonojn, ol per la dekstra? Kaj denove iu el la teamo rememoros, ke violonisto tenas la violonon ĉe la maldekstra ŝultro, kaj lia maldekstra orelo submetiĝas al la pli forta sonpremo. Jen la respondo.

– **Jam iom kompreneble. Ĉu vi povas rakonti pri la situacio en la t.n. “okcidentaj” landoj? Ĉu tie en televido ekzistas intelektaj ludoj?**

– Iusence jes, sed estas interese, ke kiam tiu ludoj trafas la rusajn TV-kanalojn, ili iĝas pli intelektaj. Mi bone memoras, kiel en Rusion venis la tutmonde populara ludo “Jeopardy!”. En la rusa televida varianto ĝi nomiĝas “Propra Ludo”. Mi estis invitita kiel unua redaktoro de tiu ludo. Tuj antaŭ la komenco de la laboroj oni avertis min: “La demandoj devas postuli nur senperan, rektan scion: aŭ vi scias kaj respondas, aŭ ne. Ekzemple: “Tiu persono estis la unua



Strigo – la simbolo de “Kio? Kie? Kiam?”

prezidento de Usono”. Se vi scias, ke li estis Washington, vi respondos. Tio estas la postulo de la aŭtoroj de la ludo, ni ja aĉetos licencon”. Mi respondis: “Ni provu konvinki ilin, ke por ni tio ne taŭgas. Ni havas aliajn tradiciojn, ni estimas memstaran, sendependan pensadon, sed ne nur posedon de scioj. Ne indas rezigni pri niaj valoroj.” Sendube, por niaj televid-spektantoj multe pli interesa estus, ekzemple, tia demando: “La unua el ili naskiĝis, plejverŝajne, ie apud Parizo, la dua – en la nordo de Francio, tria – en la sudo, sed la kvara naskiĝis ĝuste tie”. Ne eblas scii tion, ĉar pri tio estas skribite en neniun informlibro. Sed se oni komprenos, ke temas pri la herooj de la romano “La tri muskeditoj” Athos, Porthos kaj Aramis, do tuj aperos la respondo pri la naskiĝloko de d’Artagnan: Gaskonio. Jen la ĝusta respondo.

– **Ĉu la posedantoj de kopirajto konsentis?**

– Jes, ili konsentis. Kaj la ludo sukcese okazas en Rusia TV ekde 1994.

– **Sed kiun utilon havas tiaj ludoj?**

– Sendube, ili estas utilaj; ne vane ja en multaj ambiciaj lernejoj funkcias kluboj kaj rondetoj de Intelektaj Ludoj. Infanoj, kiuj frekventas ilin, ne nur pli bone lernas, sed ankaŭ pli sukcese solvas siajn sociajn problemojn, pli facile kontaktas kun samaĝuloj. Sed kial ni parolu nur pri la utilo? Ekzistas ja ne nur utilo, sed ankaŭ plezuro! Tiuj ludoj estas tiom plezuriga okupo, ke homoj, kiuj ekokupiĝis pri ili, preskaŭ neniam tion lasas. Verŝajne, tio estas la plej bona argumento!

– **Dankon pro la intervjuo, kaj ni deziru, ke ankaŭ niaj legantoj malkovru por si tiun superban ĝuon de kompreno kaj mensa plenpoveco.**

ikebano (ne en NPIV) – japandevena arto aranĝi florojn

Intervjuis T. Auderskaja

Kontrolu vian spritecon!

Karaj legantoj, provu respondi la jenajn “bonajn” demandojn, pli-malpli tipajn por la ludo “Kio? Kie? Kiam?” (vd. la respondojn sur p. 13).

1. Kiam la sciencistoj esploris, kiuj bestoj plej ofte estas atakataj de vampiraj vespertoj, oni trovis, ke la vampiroj atakas junajn bovidojn multe pli ofte, ol la plenkreskajn bovojn kaj bovinojn. Kial?

2. Usona ĵurnalistino de la 19-a jarcento Nellie Bly, leginte unu libron, decidis ripeti kaj plibonigi tion, kio estis priskribita en ĝi. Ŝi komencis fari tion la 14-an de novembro 1889 kaj finis la 26-an de januaro 1890, kaj dum tiu tempo ŝi sukcesis ankaŭ intervui la aŭtoron de la libro, kiu tiel inspiris ŝin. Nomu la aŭtoron de la libro.

3. En antikva Ĉinio ĝi eniris la kategorion “Ora lotuso”, se ĝi estis ne pli granda, ol 7,5 cm, la kategorion “Arĝenta lotuso” – se ĝi estis ne pli granda ol 10 cm. Se ĝi estis pli granda, ol 10 cm. ĝi povis eniri nur la plej malbonan kategorion “Fera lotuso”. Diru al la homo, ke ĝi estas tro granda, estis grandega ofendo. Pri kio temas?

4. En la 1970-aj jaroj, kiam la trafikaj ŝtopiĝoj sur la stratoj de Nov-Jorko iĝis ege oftaj kaj grandaj, inter la urbanoj populariĝis unu ironia ŝerco. Ĝi tekstis: “La sola maniero trafi al West Side estas...”. Daŭrigu la ŝercon.

5. Tiu ĉi tradicio aperis en la jaro 720 a.K. Ĝia kreinto estas heleno Orsippas el Megara, kiu faris iun agon tuj post la starto. Kion li faris kaj kio estas tiu tradicio?

6. Laŭ unu ŝerca rakonto, unu specialisto pri la probablec-teorio elpensis spritan (tamen, bedaŭrinde, ne tre fidindan) manieron preventi la aperon de teroristo kun bombo en la aviadilo, en kiu vi flugas. Kio estas tiu maniero?

7. Provu diveni, per kiuj vortoj 84-jara angla (naskita en Germanio) ŝakisto Jacques Mieses komentis sian venkon super 86-jara dana ŝakisto Arnold van Foreest?

8. Angloj foje diras, ke ĝi havas ses vizaĝojn kaj dudek unu okulojn. Kio ĝi estas?

9. Unu el la lastaj censoj en Japanio montris, ke en la lando, en kiu loĝas ĉ. 125 milionoj da homoj, estas ĉ. 145 milionoj da religi-kredantoj. Kiel oni povas klarigi tion?

10. En la sud-Afrika lando Bocvano oni salutas unu la alian per la cvana vorto “pula”. La saman nomon havas la landa valuto. Eĉ pli – tiu vorto servas kiel nacia devizo kaj troviĝas sur la ŝtata blazono. Pensu iom pri la lando Bocvano kaj divenu, kion signifas la vorto “pula”?



KOMPLEZE DE LA INTERNA FAKO DE OOMOTO

Pura necesejo = pura animo

Ĉu puraj necesejoj estas la bazo de
industrie potenca lando?



KOMPLEZE DE E.M.

Etsuo Miyoshi, Japanio

En Japanio aktivas la “Grupo por lerni el purigado”, kiu celas fari korojn puraj per beligo de necesejoj en publikaj institucioj kaj lernejoj. Kio estas ĝi kaj kio estas la ideologio de tiu movado?

Tiun aktivadon iniciatis Hidezaburo Kagiya, konsilisto kaj eks-prezidanto de “Yellow Hat” (ĝi estas grandega entrepreno kaj tutlanda reto de vendejoj de diversaj poraŭtaĵoj kiel, ekz., pneŭmatikoj, radĉenoj por uzo dum neĝa vetero, motor-sparkiloj ks.). Post la fondo de la kompanio, li dum multaj jaroj sola ĉiutage purigis la necesejon, tiel liverante

al la kompanioj brilpuran necesejon – ĉiuj vidis tion, sed ŝajnis ne vidi. Tamen iam aperis 1-2 kunlaborantoj, kiuj baldaŭ diris pri tiu afero: “Ni sentas nemezureblan kor-riĉon”. Poste ili serĉis malpurajn publikajn necesejojn dum dimanĉaj matenoj kaj kun ĉiuj kompanioj purigis ilin. Tiu rakonto disfamiĝis per la amaskomunikiloj kaj ĉiuloke tra la lando estis fonditaj “Grupoj por lerni el purigado”, kiuj poluras la necesejojn en lernejoj kaj publikaj institucioj.

Nuntempe konsilisto Kagiya mem per sia propra mono formas grupojn kaj elpaŝas en Tajvano, Ĉinio kaj Brazilo por disvastigi la movadon por beligi la necesejojn de la mondo. Plej kulmine, en Ĉinio kaj Brazilo s-ro Kagiya mem enpuŝis sian nudan manon en necesojn plene fek-ŝtopitan kaj malaĉigis ĝin. Liadire, gravas nur bone tondi la ungojn en la antaŭa tago. La atestantoj inspiriĝis pro lia kuraĝo, ankaŭ la lokanoj estis influitaj, do bonvolu imagi, ke ankaŭ la alilandaj necesejoj tagon post tago plibeligiĝas.

Antaŭ ĉirkaŭ duonjaro mi aŭdis, ke tia grupo purigos la necesejojn de elementa lernejo en mia urbo Higaŝikagawa, kaj pro tio, ke mi de antaŭ tri jaroj bezonas

rulseĝon, mi nur pasive partoprenis la eventon, rigardante ĝin.

Unue oni purigis la plafonon kaj la murojn. La flaviĝinta kradeto meze de la vira pisujo estis malfiksita per ŝraŭbilo kaj forprenita. La urinŝtonon, kiu kolektiĝis en la truon, oni forskrapis per fajlilo kaj poste oni poluris la pisujon tiel, ke ĝi aspektis tute nova. Post la polurado de la neceseĝo kaj la planko ĉiu pagis 1000-jenan (ĉ. 8-dolaran) kotizon por purigiloj kaj tagmanĝo; oni finis la laboron per manĝado de rizbuloj.

El la 40 partoprenantoj kelkaj homoj rakontis pri sia sperto. Mi estis ege mirigita, kiam la organizantoj invitis min fari salutparolon. Mi rakontis al la ĉeestantoj la jenon:

“Estante 23-jara mi perdis la amon; tamen mi sukcesis regajni la vivesperon per 43-taga asketado ĉe Oomoto. Tie mi ĉiumatene ellitiĝis je la 5-a kaj komencis ĉiun tagon per purigo de la necesejo. Mi uzis nur ĉifonon kaj ŝvabrileton, sed iom post iom mi ne plu sentis tiun taskon aĉa. Ankaŭ nun, kiam mi vizitas iun publikan necesejon, mi ne nur forigas la malpuraĵojn de sur la neceseĝo, sed, ekzemple, se la planko estas malseka, mi viŝas ĝin per papero kaj foriras nur forĵetinte la rubon.

Antaŭ iom pli ol 10 jaroj mi legis la verkon de s-ro Kagiya kaj ege emociiĝis. Mi rimarkis, ke unu neceseĝo de nia kompanio “Swany” iom flaviĝis. Ĉiumatene, inter 6:50 kaj 7:20 antaŭ la alveno de la dungitoj dum entute 20 tagoj mi poluradis 10 neceseĝojn, diversajn tubojn kaj la pisujajn kradojn. Neniu laboristo de la kompanio scias, ke mi sentis neimageblan kor-riĉiĝon. Pro tio, ke oni subite petas min paroli, jen unuafoje mi dividas mian sperton. Mi volas preĝi por la daŭra prospero de via estiminda organizaĵo kaj por la konstanta plibeligo de la necesejoj de Japanio kaj la mondo dank’ al la laboro de viaj manoj. Mi certas, ke via aktivado iĝos objekto de admiro en la tuta mondo. Mi pensas, ke la spirito de purigado de necesejoj ligiĝos al la fundamento de industria disvolviĝo”.

Sur la foto: la templo de Oomoto en Ajabe.

Herooj de lingva imperiismo

Roman Dobrzyński, Pollando

Toruno en Pollando, fama kiel naskiĝ-urbo de Nikolao Kopernik, lastatempe famiĝis pro tio, ke lernantoj de tiea mezlernejo batis instruiston. La evento havas interesan aspekton por esperantistoj: la batito estas instruisto de la angla lingvo. Jen la konkreta kontribuo al la batalo kontraŭ la lingva imperiismo!

Kiam mi estis redaktoro de *KONTAKTO*, tiam ni, aktivuloj de TEJO, malkovris kaj difinis la nocion „lingva imperiismo”. Ni seminariis, diskutis, kondamnis, rezoluciis, deklaris, ktp., por finfine konstati, ke kontraŭbatali tian potencon malamikon tute ne eblas. El tiu sento de senpoveco rezultis „raŭmismo”, kiun oni nun predikas kiel novan religion.

Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Havano Fidel Castro, la veterano de la kontraŭimperiisma batalo, diris: „Soy soldado del Esperanto” („Mi estas soldato de Esperanto”). Sed ankaŭ tio evidentiĝis nur deklaro, kiun ne sekvis konkretaj agoj. Nur la lernantoj en Toruno ekagis. Kompreneble, la junaj batalantoj kontraŭ la lingva imperiismo malvenkis, oni forĵetis ilin el la lernejo kaj laŭleĝe kondamnis. Ĉu ili ekhavis la ŝancon fariĝi „martiroj de nia afero”? Jen bela simbolo! Bedaŭrinde, malverŝajnas, ke TEJO aŭ UEA, ligitaj de neŭtralismo, sekvos la revolucion ekzemplon de la heroaj geknaboj el Toruno.

Mi devas aldoni kelkajn vortojn, por ne esti kune kun la torunanoj starigita antaŭ tribunalon kiel apologiisto de terorismo. Verdire, ankaŭ mi konsideras krima kaj punenda

la supre prezentitan eksceson. La polaj amaskomunikiloj disputis pri la kaŭzoj de la okazaĵo, plej ofte oni akuzis la bedaŭrindan instruiston pri nesufiĉa pedagogia prepariteco. Tamen sin altrudas la jena demando: ĉu estas nur hazardo, ke la evento okazis dum la leciono de la angla lingvo?

Lastatempe mi havis okazon kontakti gejunulojn de la mezlerneja aĝo kaj provis son-di ilian rilaton al la angla kiel studobjekto. Mi kondukis iom provoke, emfazante la gravecon de la angla, la lingvo „parolata en la tuta mondo”, la lingvo, kiu malfermas perspektivojn al profesia kariero kaj kies scipovo ĝenerale ebligas trovi bonan labor-postenon. La plimulto de miaj junaj interparolantoj tuj rimarkis la propagandan tonon en mia rezonado kaj oponis laŭ la tipa juneca stilo. Tiamaniere mi ricevis interesan lecionon, resumeblan pli malpli jene.

En Pollando, verŝajne ankaŭ en kelkaj aliaj landoj, la angla ĉesas esti mistera ŝlosilo al la mondo, kia ĝin sentis mia generacio, ĝi fariĝas rutina studobjekto, simpla lerneja ŝarĝo, cetere, tre malfacila. Kelkaj el miaj junaj interparolantoj diris, ke en iliaj lernejoj oni povas eĉ observi la malemon lerni la anglan. Ĉu la lernantoj ne aŭdis pri la graveco de tiu ĉi lingvo? Kontraŭe, ili tro multe aŭdis kaj daŭre tro multe aŭdas. Tiamaniere naskiĝas, eble subkonscie, la „sindromo de altrudo kaj opono”. Mia generacio spertis tion rilate al la rusa lingvo. Ni ignoris la rusan ne pro la politikaj motivoj, kiel nun asertas historiistoj (kiuj tiam ankoraŭ ne vivis), sed pro la juneca emo kontraŭstari ĉion altrudatan.

Ĉu temas nur pri emocioj? Tute ne: la nuntempa junularo estas racia, ĝi facile rimarkas



breĉon inter la porangla propagando kaj la reala bezono pri tiu ĉi lingvo. La nunaj lernantoj propraokule vidas la senluziĝon de iliaj pli aĝaj kolegoj, kiuj vane lernis ĝin. Ĝenerale la rezultoj de la lernado estas mizeraj. Ankaŭ tiuj, kiuj pene atingis pli altan nivelon, plej ofte ne trovas la eblon praktike utiligi sian lingvoscion.

Tamen la giganta instruindustrio de la angla dinamike evoluas. Unuopaj „fabrikoj” senkompate konkurencas inter si por ĉasi klientojn. En la varsoviaj metrostacioj pasaĝerojn sieĝas la distribuantoj de varbfolioj. Foje trairinte 20 metrojn, mi kolektis 20 varbfoliojn. Ĉiuj anglalingvaj lernejoj allogas la potencialajn klientojn per siaj „unikaj” instru-metodoj, kelkaj certigas la ekregon de la angla dum tri (!) monatoj, promesas la oksfordan atestilon, kiu onidire malfermas la pordon al la alloga labor-posteno. Mi sukcesis enketi kelkajn distribuantojn. Pluraj el ili jam lernis la anglan en lernejoj kaj diversaj kursoj, sed nun „laboras” kontraŭ

groŝa rekompenco, disdonante varbfoliojn pri lernado... de la angla lingvo! Ili klare vidas, ke tio ne estas panaceo kontraŭ la senlaboreco, kiu nuntempe suferigas junularon.

Antaŭ kelkaj jaroj mi faris por la Pola Televido kelkajn dokumentajn filmojn pri Usono, interalie pri la urbo Varsovio en la ŝtato Indianio. La temo estis preteksto por montri, kiel vivas provinca urbeto de la granda lando. Mi vizitis kelkajn lernejojn kaj konstatis, ke matematiko estas tie tre grava studobjekto. Kaj kio pri la fremdaj lingvoj? Imagu, en neniuj lernejoj oni instruas iun ajn fremdan lingvon! Konkludo: dum la usonaj varsovianoj lernas matematikon, la polaj varsovianoj lernas la anglan. Sed ne la torunanoj, ili anstataŭ lerni la anglan, batas ĝian instruiston. Jen la herooj de nia tempo...

Sur la bildoj: (supre) Varsovio, Indianio (Usono); (mal-supre) Varsovio, Pollando.

La arto



dresi drakojn

Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio

Ĉu vi iam vidis la homon, kiu kapablas dresi drakojn? Tiun, kiu kapablas ordoni al ili leviĝi de sur la tero, ekŝvebi supren, porti sian piloton super ravinoj kaj poste, kiam la drako ne plu estas bezonata, ordoni al ĝi reveni al la tero? Ho, vi dubas, ĉu mi estas sufiĉe sana mense por kredi, ke drakoj ekzistas? Sed jes – tiuj “drakoj” vere ekzistas, tamen sub iom alia nomo – “kajto”. La vorto “kajto” en Esperanto apenaŭ montras rilaton al drakoj kaj aliaj mitaj bestoj, sed en pluraj lingvoj tiu rilato estas memkomprenebla. Rigardu: ekzemple la germana “Drachen” (kajto) ege similas al “Drache” (drako), kaj en pluraj nordaj lingvoj tiuj du vortoj eĉ havas la saman skribmanieron (dana: “Drage”, norvega “Drake” ktp). En la rusa lingvo “vozduŝnij zmej” (kajto) en la rekta traduko signifas “aera (fluganta) serpento”, “aera drako” (en la rusa oni antaŭe uzis la vorton “serpento” ankaŭ por “drako”). Do, se vi volas havi personan drakon, sufiĉas nur aĉeti aŭ fari propran kajton kaj iĝi ties majstro – ofte nomata piloto.

Historio de kajtoj

Malfacilas imagi, ke la unuaj kajtoj certe ekzistis jam en la 5-a jarcento antaŭ Kristo, proksimume mil jarojn pli frue, ol la unua ŝakludo, kaj, eble, eĉ pli frue. En antikvaj Japanio kaj Ĉinio, kie plej verŝajne oni inventis la kajtojn, oni uzis ilin por pluraj celoj. Dum militoj oni fiksas specialajn zumilojn sur la kajtojn kaj nokte lasis tiujn flugi direkte al malamiko kaj disvastigi teruran bruon, kiu vekis grandan

panikon en la malamika tendaro. Eĉ tage tiuj aparatoj, kutime lerte pentritaj, povis timigi malamikojn. Krom por timiga efiko oni uzis kajtojn por sendi signalojn al diversaj taĉmentoj dum atako – la ŝvebanta kajto estis videbla de tre granda distanco.

Verŝajne pro sia milit-rilata apliko kajtoj longe restis nekonataj en Eŭropo, nur en 16-17-a jarcentoj dank’ al la komercaj rilatoj inter eŭropaj landoj kaj fora oriento la unuaj kajtoj venis al Eŭropo. Ili rapide disvastiĝis, sed nur kiel infan-ludiloj. Nur post preskaŭ 2 jarcentoj eŭropaj sciencistoj ekkonsciis pri la ebla esplora apliko de kajtoj – tiel okazis la fama eksperimento de Franklin, kiu sukcesis kapti la “ĉielan elektron” pere de kondukilo fiksita al kajto. Alia konata scienca eksperimento, aranĝita proksimume samtempe, estis la eksperimento de Thomas Melvill kaj Alexander Wilson – ili uzis kajton por esplori la temperaturon en diversaj atmosfer-tavoloj.

Kompreneble la kajtoj ne restis sen atento de milit-servo, kaj okazis pluraj provoj ekuzi ilin por militaj celoj. Tio sukcesis nur parte, ĉar la aviado (kies progreso estis spronita interalie ankaŭ per la per-kajtaj eksperimentoj) evidentiĝis multe pli milit-taŭga, ol kajtoj. Tamen kelkaj kompanioj kreis sufiĉe sukcesajn prototipojn kaj eĉ produktis kajtojn industrie. Ekzemple, la tiel nomata “Gibson Girl” estis speciala malgranda kajto, kiun dum milito havis ĉiu piloto. Se la aviadilo devis surakviĝi, aŭ la piloto trafis akvon, li povis lanĉi tiun kajton, (kiu portis malgrandan malpezan antenon) supren, kio ebligis la sendon de la SOS-signal.

Nuntempe kajtado restas ĉefe nur kiel hobbio, praktikata en multaj landoj. En

kelkaj landoj, ekzemple Koreio, Japanio kaj Afganistano, oni tradicie lanĉas kajtojn dum novjara festo. Tiuj kajtoj kutime havas buntajn kolorojn kaj neordinaran formon, imitante diversajn figurojn, botelojn (de diversaj bier-markoj) kaj bestojn. En multaj landoj ekzistas specialaj unuiĝoj de kajto-ŝatantoj, kiuj okazigas grandajn lanĉojn kaj prizorgas ĉiujn formalajojn por siaj anoj: ekzemple en Germanio kajto estas taksata kiel “flug-aparato” kaj por stiri ĝin oni bezonas specialan asekuron (por eviti la problemojn en la okazo, ekzemple, se la kajto damaĝos elekto-liniojn ks.).

Kiel konstrui kajtojn

Kvankam kutime oni povas aĉeti kajton jam preta en speciala butikoj, miajn unuajn 7-10 kajtojn mi konstruis mem – en tiutempa Sovetunio oni apenaŭ povis aĉeti tiun ludilon, sed multis libroj por adoleskantoj, kiuj detale klarigis, kiel oni povas konstrui propran kajton.

La plej simpla kajto estas la tiel nomata “paraŝuta kajto” aŭ “unu-ala kajto”, konata en Usono sub la patentita nomo “Eddy kite”, laŭ ties inventinto Willian Eddy. La kajto konsistas el unu alo, kiu havas la formon de neregula rombo. La bazon de la kajto konsistigas malegal-latera (katolika) kruco kun kelkaj tabuletoj ĉe perimetro: du najbaraj flankoj, kiuj konsistigas la frontan parton de la kajto estas malpli longaj kaj formas obtuzan angulon, dum la subaj du flankoj estas pli grandaj kaj estas interkonektitaj je akuta angulo. Ĉe ĉiu



WIKIPEDIO

La patentita priskribo de la kajto de Willian Eddy

angulo de la kajto oni fiksas ŝnurojn, kiujn oni kunligas al unu ŝnuro, kiun la piloto tenas en sia mano. Pro tio oni povas aldone klasi tiun kajton kiel unu-ŝnurajn kajton. La avantaĝo de tiu kajto estas la simpleco de la konstruo – oni bezonas nur du vergojn por centra kruco, kvar maldikajn bastonetojn por la randoj kaj iom da ŝtofo, kiun oni streĉe fiksas sur la ligna skeleto. La malavantaĝo de tiu kajto estas ties negranda levoforto kaj nestabileco – por kraŝigi tiun kajton sufiĉas nur iom tro forte aŭ nekonvene tiri la stir-ŝnuron. Por iom stabiligi la kajton oni ofte aldonas sufiĉe longan “voston” el ŝtofo aŭ diverskoloraj fadenoj, kiu stabiligas la kajton kontraŭ nelerta stirado kaj vento-blovo.

Se oni parolas pri unu-alaj kajtoj, oni devas nepre mencii, ke ekzistas pluraj variantoj de tiuj kajtoj, kiuj ĉefe diferencas per sia formo. Se la alo havas la formon de egallatera plurangulo, tia kajto nomiĝas “Bermuda kajto”. Se la kajto similas la kajton de Eddy, sed prezentas forme simetrian sesangulon, kunpremitan ĉe la flankoj, oni parolas pri “streĉita” aŭ “fleksita kajto”. Al tiu tipo apartenas, ekzemple, la fama japana kajto *rokkaku*, speciala tipo de “batalaj kajtoj”. Tiu kajto sen vosto estas nestabila, kaj por iom stabiligi ĝin oni iom fleksas la perpendikularajn trabetojn supren – tiel, ke la kajto similas platan kuveton, kun la randoj levitaj supren. Tio faras la kajton pli facile stirebla kaj pli stabila kontraŭ la flankaj blovoj. Fakte, pro sia sufiĉe granda areo tiu kajto posedas ege grandan levoforton, kaj oni provis uzi tiujn kajtojn por militceloj. Nuntempe oni plu uzas ilin por speciala kajto-fotado – tiu kajto senprobleme portas sufiĉe pezan foto-ekipaĵon.

Same unu-alaj estas diversaj sportaj kajtoj, kiujn oni nun plej ofte povas vidi en butikoj. Kutime tiuj kajtoj havas la formon de triangulo aŭ greka litero “delta” (pro tio la dua nomo de tiuj kajtoj estas “deltaj kajtoj”), kaj oni uzas ilin en sportaj celoj: kutime tiuj kajtoj havas multajn stir-ŝnurojn kaj estas malfacile stireblaj. Tamen, stirataj fare de profesiulo ili estas tre movemaj kaj stabilaj.

Aparte staras diversaj glisparaŝutoj, kiuj similas al kajtoj per tio, ke ili kutime havas alon por glisi en aero, ne havas motoron kaj povas porti homon. Glisado estas jam alia sporto-branĉo, foje paraŝutojn ĉi tie oni tracidie nomas kajtoj – ekzemple, specialaj aŭtomate pleneblaj kajtoj, kiuj enlasas aeron post lanĉo kaj formas grandan (kaj sufiĉe stabilan) alon, kiu

senprobleme kapablas porti eĉ homon.

Iom pli komplika, sed multe pli stabila estas la t.n. “skatola kajto”. Kontraste al la unu-ala kajto ĝi ne havas nur unu alon, sed konsistas el kelkaj surfacoj, aranĝitaj skatol-forme. Tiuj kajtoj kutime aspektas ne tiel alloge kompare al kutimaj (kaj tiom pli – al artaj) kajtoj, sed vere estas ege stabilaj. Krome, oni povas ĉiam alfiksi voston ĉe la plej malantaŭa flanko de la kajto por plia stabiligo. Ĉe mezforta vento sufiĉas nur forte suprenĵeti la kajton kaj ekstreĉi la stir-ŝnuron por ke la kajto, kaptita de la suprena ventofluo, estu trenita supren ĝis sufiĉa alto. La kajto estas tiel stabila, kaj la levo-forto povas esti tiel granda, ke foje malfacilas retiri ĝin surteren! Kaj preskaŭ ne eblas kraŝigi ĝin per mallerta ŝnur-tirado, kio facilas en la okazo de pli simplaj kajtoj. Oni povas eĉ pli stabiligi la kajton, se oni aldonas pliajn surfacojn – foje dum grandaj kajtaj aranĝoj oni povas vidi kajtojn, kiuj konsistas el 4, 8, 16 kaj eĉ pli da “etaĝoj”.

Ekzistas ankaŭ aliaj variantoj de kajtoj, sed ili estas multe malpli ofte uzataj.

Kajtado

Ekzistas diversaj “artaj” branĉoj de kajtado. Oni ofte konstruas diversajn artajn kajtojn – tiuj kajtoj ne nepre estas perfektaj de la teknika vidpunkto, sed ili redonas la formojn de konataj objektoj: ranoj, drakoj, mar-steloj, homaj figuroj, bier-boteloj ktp. Tiuj kajtoj, simile al artoformaj aerbalonoj, ŝvebas en la aero nur por estetikaj celoj.

Tute aparte staras la sporto – kajtado en fermitaj konstruaĵoj. Ĉar evidente ne eblas uzi venton por lanĉi kajtojn en eĉ plej ampleksaj ĉambroj, la piloto devas esti kapabla lanĉi la kajton nur trenante ĝin per la stir-ŝnuro (dum la kur-distanco estas kutime tre limigita). Oni vere devas esti profesiulo aŭ almenaŭ bone trejnita homo por povi lanĉi kaj stiri kajton en tiaj kondiĉoj – kaj tio vere jam fariĝas pli sporto, ol hobbio.

Alia, iom brutala maniero de kajtado estas la kajto-bataloj. Tiu sporto estas sufiĉe populara en multaj aziaj landoj, kaj oni uzas specifajn kajto-tipojn por tio. Tiuj kajtoj havas proprajn nomojn: *tukkal* (hindia batala kajto), *hata* kaj *rokkaku* (japanaj), *ĉula* kaj *pakpao* (tajlandaj) ktp. La plej kutima tipo estas la batalo, dum kiu oni devas tranĉi la stir-ŝnuron de la kontraŭulo per sia stir-ŝnuro aŭ per la flankoj de sia kajto. Por tiu celo oni faras ŝnuron el speciala materialo kun algluita abraziaĵo: historie oni uzis pistitan vitron



Farante la tradicion “ŭau jala budi” kajton en Malajzio



90 futojn longa “polpa” kajto



aŭ riz-ŝelojn, kiuj estis sufiĉe akraj por tranĉi la ŝnuron dum frotado. La kajtojn mem oni konstruas plejble malpezaj, uzante paperon por la alo kaj bambuon por la skeleto – tiel oni povas atingi pli altan manovro-kapablon de la kajto. Plia grava kondiĉo – oni rajtas uzi nur unu-ŝnurajn kajtojn dum la batalo.

Krom tranĉo-bataloj oni foje okazigas ankaŭ kraŝ-batalojn, kiam la sola celo estas kraŝigi la kajton de la kontraŭulo kaj teni sian kajton en aero almenaŭ dum kelkaj pliaj sekundoj. En tiuj bataloj oni jam povas uzi aliajn tipojn de kajtoj (ne nepre unu-ŝnurajn) kaj provi optimume kombini manovro-kapablon kaj stabilecon.

Lastatempe en Usono populariĝis iom pli civilizita tipo de kajto-batalo: kiam ne necesas tranĉi aŭ kraŝigi la alian kajton, sed oni gajnas poentojn, kiam oni tuŝas la kajton de la kontraŭulo desube aŭ desupre. La variaĵon de la tuŝo (ĉu desupre aŭ desube) oni anoncas kiam ambaŭ kajtoj

estas en neŭtrala zono pretaj por batalo. Gravas, ke la kajto ne rajtas forlasi certan zonon dum tiu batalo – tio aŭtomate donas unu poenton al la kontraŭulo; la kajto ankaŭ ne rajtas kraŝi. Post akiro de certa punkto-nombro oni decidas pri la venkinto. Dum tiuj “bataloj” la kajtoj ne estas tre damaĝataj, kvankam la batalo mem postulas ne malpli da sperto kaj lerto, ol okaze de la aliaj kajto-bataloj.

Ĉu infana petolaĵo aŭ serioza hobbio?

Multaj emas konsideri kajtadon kiel infan-okupon sen seriozaj efikoj kaj aplik-eblaj. Tio tute ne veras. Kajtado similas al ĉiu alia sporto – ĝi ebligas al oni pasigi pli da tempo en naturo, postulas lertajn manojn por konstrui kaj stiri la kajtojn kaj foje povas eĉ helpi gajni monon.

Jen la fama historio pri unu dekdu-jara knabo, kiu gajnis grandan monpremion per sia kajto. La registaro de Kanado



serĉis ideojn por konstrui la pendo-pontojn super la Niagara akvofalo – la ĉefa problemo estis streĉi la unuajn ŝnuregojn inter la du flankoj de la rivero. Neniu el la ideoj (pafado, uzo de helikoptero ktp) proponitaj de konstru-inĝenieroj sukcesis, ĝis tiu knabo simple kraŝigis sian kajton ĉe la transa flanko de la akvofalo. Oni alligis dikan ŝnuregon al la stir-ŝnuro de la kajto kaj streĉis la bezonatan ponton sen grandaj mon-elspezoj.

Bilet-kolektado: same interesa!

Vladimir Melnikov, Rusio

Dum sovetia tempo por eniri metropolitenon oni uzis ordinarajn 5-kopekajn, poste 15-kopekajn monerojn. Tamen en 1992 ekgalopis inflacio, la tarifoj senĉese kaj rapide ŝanĝiĝis kaj ne plu estis samaj en diversaj lokoj. Do en ĉiu urbo aperis diversaj specoj de ĵetonoj kaj biletoj. Eĉ se ili estus samaj en la sama urbo – jam tiakaze estus interese kolekti ilin, sed ja sistemoj konstante ŝanĝiĝas kaj modifiĝas.

En Moskvo dekomence oni uzis metalajn ĵetonojn – poste evidentiĝis, ke ilia produktado estas multekosta. Sekvis ĵetonoj plastaj – sed post kelkaj jaroj la falsaj ĵetonoj pli multis ol la aŭtentaj. Poste aperis kartonaj magnetaj biletoj por diversaj kvantoj de veturoj – de 1 ĝis 60, por diversaj uzotempoj, ankaŭ kombinitaj, rabatitaj

kaj senpagaj; tiuj biletoj kelkfoje ŝanĝis sian aspekton. Nun oni uzas senkontaktajn kartojn. Intertempe malnovajn metalajn ĵetonojn kun la teksto “Moskva metropoliten” oni ekuzis en Jekaterinburgo, kie la iamaj plastaj ĵetonoj triviĝis, sed mendi la novajn ne eblis, ĉar la produktinta fabriko jam ne ekzistas...

Sur la ĵetonoj kaj biletoj aperas simboloj de urboj, lokaj vidindaĵoj k.a., ekzemple: folioj kaj floroj de kaŝtano (Kievo), monumento al nacia heroo Sasunci David (Jerevano), mevo super Volgo (Samaro), famaj arkitekturaĵoj (Ĥarkovo). En la metropolitenoj de Ĥarkovo (Ukrainio) supozeble laboras/is iu kolektanto: la tieaj ĵetonoj havas 5 aŭ 6 diversajn kolorojn kaj ĉ. 20 diversajn bildojn reverse.

Metropolitenaj biletoj kaj ĵetonoj fakte ripetis la historion de poŝtmarkoj – el simpla

pagilo ili transformiĝis en art-miniaturojn, laŭ kiuj oni povas studi historion kaj geografion. Okaze de malfermo de ĉiu nova metrostacio, okaze de datrevenoj de la metropolitenoj kaj pro diversaj memorindaj eventoj la Moskva metropolitenoj eldonas specialajn biletojn etkvante – kelkajn vi povas vidi sur la foto. Krome, ekzistas biletoj kun diversaj reklamoj k.a. Do estas vere interese kolekti ilin, ne malpli interese, ol

poŝtmarkojn – eĉ se dume tiaj kolektantoj ne tiel multas...

Mi kolektas ankaŭ biletojn por urbaj busoj kaj tramoj (vidu parteton sur alia foto). Ankaŭ ili nun estas diversaj en ĉiu urbo, ofte kun iaj lokaj specifaĵoj. Ĉiuj miaj amikoj bone scias pri mia hobbio kaj volonte alportas biletojn kaj aliajn similajn aferojn el diversaj landoj – do mia kolekto iom post iom kreskas.





Rat-Man: pliriĉigu vian kolekton!

Daniele Binaghi, Italio

Leo Ortolani, la itala aŭtoro de Rat-Man, komiksa superantiheroo, kiu nun oficiale parolas ankaŭ Esperanton, ĉiam atentis pri ĉiuj aktualaj temoj, kaj certe ne povus forgesi la kolekto-maniojn, kiuj nuntempe vagadas tra la mondo kiel nova vento. Jen do kio povus okazi al tiaj kolektadoj de ludkartoj, por kiuj homoj pretus eĉ vendi siajn enajn organojn... Sed vi vere ne bezonos tion fari por aĉeti ekzempleron de la komiks-libro de Rat-Man (ĉiuj informoj troveblas ĉe <http://www.pecorElettriche.it/Esperanto/RoMEo/>): ĝi kostas nur 6,00 eŭrojn. Kaj nun, pardonu min, mi devas iri al la bazaro por gajni iom da mono per mia reno...

Respondoj al la demandoj sur p. 7

1. La vampiroj atakas nur dormantajn bestojn, kaj la bovido ja dormas pli longe, ol la plenkreskaj bestoj.

2. Temas pri la franca verkisto Jules Verne kaj pri lia romano "Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj". Nellie Bly (la vera nomo estas Elizabeth Jane Cochran) sukcesis fari la ĉirkaŭmondan vojaĝon dum nur 72 tagoj.

3. Temas pri piedoj. Virinoj en antikva Ĉinio speciale malgrandigis (fakte, kripligis) al si la piedojn por beleco, foje tiel, ke ili eĉ ne povis paŝi.

4. "... estas naskiĝi tie".

5. Tuj post la starto li demetis la tunikon. Ĝuste ekde 720 a.K. la helenoj dum Olimpikoj konkuris nudaj.

6. Vi mem devas preni bombon en aviadilon, ĉar la probableco de tio, ke du homoj samtempe enportos bombon en aviadilon estas ekstreme malgranda.

7. "Kiel ĉiam la juneco venkis!"

8. La ĵetkubo.

9. En Japanio multaj homoj konfesas samtempe du religiojn: budhismon kaj ŝintoismon, kiuj ne kontraŭas unu la alian.

10. La vorto "pula" signifas "pluvo" (Bocvano estas relative seka lando).

Rat-Man © Leo Ortolani, 2008 – esperantigis Daniele Binaghi

Akceptinda invito

Paŭlo Moĵajev, Ukrainio

“Invito por vojaĝo” de J. Yvart; miksformata KD, 15 titoloj kun la suma daŭro de 52 min., perkomputile spektebla video kaj 15 mp3-dosieroj kun karaoke-versioj de la kantoj, tekstolibreto, eld. Vinilkosmo, 2008

Franca kantisto Jacques Yvart estas jam konata artisto en Esperantujo – en la jaro 1998 li registris Esperantan albumon “Yvart kantas Brassens”. La nova albumo daŭrigas la tradicion de la antaŭa: ankaŭ nun la pli grandan parton okupas pensigaj, plejparte malrapidaj kaj minoraj kantoj (malgraŭ tio, ke enestas ankaŭ helaj, satiraj kaj eĉ iom ŝercaj), en kiuj la ĉefan parton okupas la tekstoj – tio, kion oni kutimas nomi “barda kanto”. Tio tamen ne signifas, ke la muzikoj estas tute neatentindaj – male, eĉ iom simplaj melodioj ofte estas aparte kortuŝaj kaj

agrablaj.


La albumo prezentas la kantojn de diversaj aŭtoroj (i.a., de tiel famaj kiel Leonard Cohen, Georges Moustaki, Georges Brassens), sed ankaŭ komponitajn de la artisto mem. La ĉefa temo de la tekstoj estas resumita en la titolo de la albumo: vojaĝado tempa kaj spaca, spirita kaj rememora. Tamen preskaŭ ĉiam la vojaĝa temaro estas nur fono, kiu iom maskas la meditadojn pri la homo, ĝiaj taskoj en la mondo kaj ĝia futuro.

Kompare al la antaŭa albumo rimarkinde buntigis la muzikaj koloroj – dank’ al la bona aranĝista kaj muzikista laboro ĉiu kanto vere havas preskaŭ unikan muzikan veston. Malgraŭ la muzik-aranĝa varieco ĉio sonas tre harmonie, orel-plaĉe kaj, mi diru, trankvilige. La kantado estas entute bona (malgraŭ tio, ke la plenumanto ofte transiras de la kantado al iom recitativaj intonacioj), la elparolo de la kantisto estas

mirinde klara.

Menciindas, ke, kontraste al multaj aliaj kantoj en Esperanto, en la kantoj de la albumo preskaŭ mankas poeziaj licencoj kaj mislokitaj akcentoj; tekstoj sonas glate kaj estas relative facilaj lingve. La laboro de la tekstaj adaptistoj (inter kiuj troviĝas interalie R. Cash kaj J. Le Puil) vere meritas admiron.

Ankaŭ ĉi-foje Vinilkosmo daŭrigas la tradicion prezenti sur siaj diskoj aldonajn materialojn. Per komputilo eblas trovi sur la disko karaokeajn versiojn de ĉiuj kantoj kaj ankaŭ ĉ. 6-minutan videan dosieron, kiu prezentas kelkajn “laborajn momentojn” en la son-studio kaj ankaŭ etan intervjuon kun la artisto (tamen, ĝi estis filmita eble iom mallerte – spektante ĝin mi ne povis



forpeli la impreson, ke la intervjuanto ege malhelpas al la intervjuato kaptadi fiŝojn). Bonkvalita tekstolibreto (preskaŭ sen tajperaroj) kronas la bonan laboron.

La disko certe ne estas “leĝera aŭskultaĵo”, kaj do eble taŭgos ne al ĉiu esperantisto, tamen la ŝatantoj de seriozaj kaj pensigaj kantoj certe estos kontentaj. La disko estas vere elstara atingo de Esperantujo sur la muzika kampo, kaj la invito vojaĝi kune kun J. Yvart – nepre akceptinda.

Oni ankoraŭ ne certas!

Leginte la reagon de Oleg Izjumenko al mia artikolo “Mitoj pri naturprotektado” (*KONTAKTO* 2007:5) mi kun bedaŭro devis konstati, ke granda abismo ankoraŭ faŭkas inter scienco kaj naturprotektado, kaj la lasta – malgraŭ la penoj prezenti ĝin kiel sciencan teorion – restas nur iu morala kategorio: trafa argumento kaj alloga ĵonglaĵo en la manoj de politikistoj kaj demagogoj. Per tio mi tute ne volas diri, ke ĝi estas iu senvalora afero – tute ne! – sed mi simple volus atentigi la legantojn de *KONTAKTO*, ke oni estu pretaj, ke fakuloj pri la afero tute ne konsideras ĝin almenaŭ iagrade scienco.

Malgraŭ ĉio mi volas danki al Oleg pro tre atenta lego de la artikolo kaj korekto de unu

vera miso – la mezur-unuo por karbondioksido vere estis mistradukita de mi. Ĉiuj pliaj korektoj nur kompletigas mian artikolon (eĉ se estas skribitaj de iom alia vidpunkto), do, oni plej verŝajne povas paroli ne pri “misoj”, sed pri “nesufiĉe detala priskribo”. Mia celo estis ne doni ekzaktan detalo-riĉan priskribon de la temo, sed nur doni superrigardon kaj klarigi mian vidpunkton de pragmata sciencisto. Pro la sama kialo mi neniel tuŝis la moralan aspekton de naturprotektado. Mia opinio, ĉiuj argumentoj pri “popersona malpurigo” kaj “moral problemo”, kiuj ja estas bonaj argumentoj en la buŝo de profesia ekologo, tamen apartenas al tute alia diskuto.

Ne nur mi, sed ankaŭ Oleg faris gravan eraron, kiam li parolas pri “unuvoĉa konsento” inter klimatologoj rilate la kialojn de la plivarmiĝo. En la raporto de IPCC, kiun Oleg mencias kiel fonton por tiu aserto, vere estis grava progreso pri tiu interkonsento: se en la tria raporto, publikigita en 2001 oni parolis pri (nur!) “verŝajna” homa influo al tio (66% de verŝajneco), en la kvara raporto oni parolas pri “tre verŝajna” – do, la verŝajneco restas inter 66% kaj 90%, kaj en la raporto troviĝas eĉ aparta piednoto, kiu klarigas, ke la nuntempaj metodoj ne povas liveri precizan respondon al tiu demando. La pritakso “tre verŝajna”, kompreneble, estas sufiĉe grava kaj atentinda, sed IPCC difinas pliajn kategoriojn: “treege verŝajna” kaj “preskaŭ certa”

kun eĉ pli grandaj verŝajnecoj – do, dume la konsento troviĝas preskaŭ en la mezo de la “verŝajneco”-tabelo, kiun oni donas en la suplemento de la raporto. Do, Oleg ja pravas pri tio, ke la “konsento” plifirmiĝas, sed pri unuvoĉa pruvita konsento ankoraŭ tute ne eblas paroli!

Mi volus mencii ankaŭ, ke mi dum pluraj jaroj okupiĝis pri praktika ekologio, nome pri scienca pritakso de malpurigo de akvejoj (riveroj, lagoj k.t.p.). Se la legantoj de *KONTAKTO* havas iujn demandojn rilate tiun flankon de ekologio kaj naturprotektado, tiuj demandoj estas ĉiam bonvenaj ĉe mi.

Aleksandro Galkin <Alaudo@gmail.com>, Rusio/Germanio

Karavano tra Orobie-montaro kaj Esperanto

Kio estas kaj kiam okazos?

La "Karavano de Orobie" estas iniciato de la medi-protektita organizo Legambiente Bergamo. Unu el la aktivaj kunorganizantoj de la Karavano estas Marino Curnis (itala esperantisto kaj vojaĝanto, fama pro la piedvojaĝo el Bergamo al Irano "Eurasia Pedibus Calcantibus", pri kio *KONTAKTO* kelkfoje raportis). La celo de la Karavano estas subteni la ekologian turismon. La partoprenantoj iros piede dum 18 tagoj (ĉ. 300-kilometra distanco) tra 44 etaj vilaĝoj kaj urboj. La itinero pasas tra la teritorio de la ekologie pura Regiona Parko "Orobie". Dum la marŝado okazos kelkaj "oficialaj" eventoj (precipe vespere) kaj renkontiĝoj kun la lokaj loĝantoj por malkovri la lokan kulturon. Nokte la partoprenantoj loĝos en malmultekostaj aŭ eĉ senpagaj ejoj (ekz., en lernejoj ks.). La manĝado estas memzorga. Oni

havu proksimume 15 eŭrojn por ĉiu tago. La piedmarŝo okazos inter la 23-a de aŭgusto kaj la 10-a septembro 2008.

Kial ni volas partoprenon de esperantistoj?

Tiu ĉi jaro estas la internacia jaro de lingvoj. Ni opinias, ke per la Karavano kaj per la esperantista partopreno ni povos allogi la atenton de la amaskomunikiloj al la temoj kiel medio, ekologia turismo, lingvoj kaj Esperanto.

Ĉiuj interesatoj pri la iniciato kontaktu Marino Curnis:
<mkurnys@yahoo.it>

Korekto

La aŭtorino de "Anguleto" el la numero 2007:5 ("Brakumi la teron") estis ne Aneta Ubik, sed Olga Ĥromova (Moldavio). La redakcio pardonpetas pro la eraro.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi

ne nur subtenas la esperantistan junularon;

de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *Kontakto*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejanaj kaj komencantoj

– aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plukoloraj paĝoj kun plenkol-
oraj kovriloj;

– havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;

– rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉetotablaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

Kotiztabelo de UEA por 2008

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	96	58	35	192
Aŭstrio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Belgio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Brazilo/eŭro	5	12	29	17	10	58
Britio/pundo	6	16	39	25	15	78
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	70	170	430	275	165	860
Estonio/krono	85	210	515	325	195	1030
Finnlando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Francio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Germanio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Greklando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Hispanio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Islando/eŭro	9	23	58	35	20	114
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lato	4	9	23	15	9	46
Litovio/lido	18	45	110	70	42	220
Nederlando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dol.	18	45	113	68	41	226
Pollando/zloto	22	55	140	90	54	280
Portugalio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Rusio/eŭro	5	12	29	17	10	58
Slovakio/krono	230	570	1425	910	550	2850
Slovenio/eŭro	6	16	40	25	15	80
Svedio/krono	85	215	540	345	205	1080
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	12	29	72	43	26	144
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	29	17	10	58

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro kaj Slovenio laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Bulgario, Latvio, Litovio kaj Rumanio laŭ Estonio.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Mallongigoj:

MG: Membro kun Gvidlibro

MJ: Membro kun Jarlibro

MJ-T: MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon TEJO Tutmonde)

MA: Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto)

MA-T: MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon TEJO Tutmonde)

SA: Simpla abono de la revuo Esperanto sen membreco

Kto: Simpla abono de la revuo *KONTAKTO*

SZ: Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membreco)

PT: Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj TEJO Tutmonde)

DM: Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ: Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oblo de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2008 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1-an de januaro 2008 (t. e. kiuj naskiĝis en 1978 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas aboni ankaŭ la revuon TEJO Tutmonde sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando. Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

Dolĉa inkujo aŭ leciono de rido



Maria Lajevskaja, Belorusio

Finigis la Dua mondmilito. Komenciĝis la pacaj tagoj. Dum la milito oni mortigis mian patron kaj baldaŭ mortis mia patrino. Mia infaneco pasis en **orfejo**. 15-jara mi lasis la orfejon kaj komencis mian mem-staran vivon.

Post la milito multaj homoj volis lerni, ĉar ilian lernadon interrompis la milito. Pro tio, ke oni devis ankaŭ labori por subteni sin, multaj gejunuloj lernis en specialaj vesperaj lernejoj por la gelaboristoj. Ankaŭ mi fariĝis lernantino de tia lernejo. Preskaŭ ĉiuj en nia klaso estis grand-aĝaj viroj; nur mi kaj mia amikino Galina estis tre junaj. La viroj nomis nin “filinoj”.

Foje mi kaj Galina decidis rigardi la filmon “Printempo sur Zarjeĉnaja-strato”. Sed la filmon oni montris nur vespere, kaj ni decidis forkuri de la unuaj lecionoj. La vetero estis malvarma. Sur la teron falis belaj blankaj grandaj neĝeroj, kiuj longe rond-iris en aero. Sur la tero estis multege da neĝo. Antaŭ ol eniri la klubon, en kiu okazis la prezento de la filmo, ni faris profundaĵojn en la neĝo kaj metis tien niajn paperujojn kune kun la lerno-libroj, kajeroj kaj mia vitra **inkujo**. Nian kaŝ-lokon ni kovris per neĝo kaj trankvile ekiris rigardi la filmon.

Post kiam la filmo finiĝis, ni eliris el la klubo, prenis niajn lerno-sakojn el la

neĝa kaŝejo, purigis ilin de la neĝo, kaj, feliĉaj kaj trankvilaj, ni direktis nin al la lernejo. Dum la vojo ni gaje parolis kaj interŝanĝis la opiniojn pri la filmo. Iu-momente mi levis la kapon. La vespera ĉielo estis kovrita de mult-nombraj helaj steloj. En la aero malrapide turniĝis belaj neĝeroj. Mi haltis kaj rigardis ilin – ilia beleco tre plaĉis al mi. Galina koleriĝis kaj ekkriis: “Kial vi staras? Ni malfruas al la sekva leciono!”. Kaj ni kune ek-kuregis al la lernejo.

Vere, ni iom mal-fruiĝis, tamen ni eniris la klason, rapide de-metis la suprajn vestojn kaj eksidis. Mi prenis el la lerno-sako la inkujon, kajeron, plum-ington kaj rimarkis, ke mia kajero estas iom malseka. Sed mian atenton forkaptis la viroj, kiuj sidis antaŭ ni: ili diris malkontente, ke pro nia malfruiĝo ili devis skribi per la kraĵoj. Galina akre re-batis, ke necesas havi siajn inkujojn. Finfine ĉiuj trankviliĝis kaj ekaŭskultis la instruistino. Ŝi legis la frazojn kaj ni devis skribi ilin en la kajeroj. Niaj najbaroj-viroj metis la plumojn en la inkujon kaj volis ion skribi, sed ne atend-ite oni ekvidis strangajn grizajn **kristaletojn**. Ili pur-igis la plumojn, kaj denove metis ilin en la inkujon – sed ĉio ripetigis. Tiam unu el la viroj diris kolere: “Filinoj! Ĉu vi al-donis sukeron al la inko?” Ankaŭ mi kaj Galina metis la plumojn en la inkujon kaj ekvidis samajn grizajn kristaletojn. Strange, sed mi ne

povis kompreni, kial tio okazis. Mi ja ne havis sukeron...

Sed subite en mia kapo aperis la ideo: “Neĝo, blanka neĝo! Tio estas neĝo, kiu trafis nian lernosakon, kiam ni kaŝis ĝin!” Vere – iom da neĝo trafis la inkujon kaj la inko preskaŭ glaci-iĝis pro la malvarmo. Kiam ni eniris la klas-ĉambron, la neĝo akviĝis kaj miksiĝis kun la inko – tial ĝi ne plu skribis bone, sed lasis sur la papero nur grizajn kaj malpurajn liniojn. El mia brusto preskaŭ el-saltis rid-ego, sed mi penis kaŝi ĝin. Tamen, mi ne sukcesis kaj falis sur la lerno-**benkon**, kovris la vizaĝon per la manoj kaj ek-rid-egis. Ankaŭ Galina komprenis, kio estas la kialo de mia rido, kaj ekridis mem. Niaj grand-aĝ-uloj rigardis nin kaj ne povis kompreni, kial ni ridas. Sed nia rido tuŝis ilin, kaj baldaŭ ekridis ĉiuj en la klas-ĉambro. Eĉ nia serioza instruistino ridetis, kvankam ŝi tute ne komprenis, kio estas la kialo de nia rido. Tiel la serioza leciono transform-iĝis en lecionon de rido.

benko – longa meblo por sidi

inko – speciala nigra akvo, per kiu (uzante plumon) oni skribas sur papero

kristalo – malgranda peco de iu materialo (ekz., glacio aŭ sukero), havanta tre regulan kaj belan formon

orfejo – loko, kie loĝas la infanoj, kies gepatroj mortis (orfoj)